Antaŭparolo

La kreskanta volo de la religioj servutigi la tutan socialan vivon en Francio kaj en la tuta mondo (ekzemple en Alĝerio, kie multiĝas murdoj al intelektuloj) devas konduki ĉiujn liberajn spiritojn analizi ilian naturon mem.
Ili ĉiuj pretendas posedi la « veron », kiun ia « Dio »,ilia « Dio » estus diktinta al ili. Analizo de la religiaj tekstoj montras male, ke temas pri teksaĵo el kontraŭdiroj, eraroj kaj plej diversaj stultaĵoj.
Tiujn legendarojn pene kunigis dum jarcentoj sentalentaj, laboremaj kaj suficxe nesciaj kopiistoj. Ili havas nenian valoron por lumigi la homaron. Kondamninte Galileon, Darvinon, vakcinadon, bruliginte milojn da vivantoj la katolika eklezio kaj la evangeliaj sektoj lanĉas novan krucmiliton, kiu laŭnome de ilia « morala ordo » atakas la plej diversajn liberecojn (pens-, esprimliberecon, liberan abortigon, liberan kontraŭkoncipadon…)
Jam tempo estas reagi kaj stigmatizi la religian trompon.

Noto de la tradukintoj : Ĉiuj evangeliaj citaĵoj estas el la traduko : La Nova Testamento de Nia Sinjoro kaj Savanto Jesuo Kristo - La Brita kaj alilanda Biblia societo, 1986. La nomoj de la antikvaj verkistoj estas citataj en la latina aux greka lingvoj.

C.N.T-A.I.T 7 rue « ST » REMESY, 31000 TOULOUSE, FRANCIO
Por la traduko
Liberpensula frakcio de SAT, 67 av. Gambetta, F 75020 PARIS
Eldonejo IPSA
Castelmaurou, Francio

Ĉifonul
Tradukis la liberpensula frakcio de SAT

# LA EVANGELIOJ ESTAS ELPENSITAĴO

1€

# I - KIO ESTAS LA EVANGELIOJ ?

La kvar evangelioj, laŭ Mateo, laŭ Marko, laŭ Luko kaj laŭ Johano, listiĝas inter la fundamentaj dokumentoj de la kristanismo. Iuj sektoj konsideras ilin eĉ kiel la solajn sanktajn librojn. Por la katolika eklezio ili estas unu el la ĉefaj apogoj de la kredo.

Pri kio ĉefe temas en tiuj evangelioj ?

Por kompreni ni devas unue konsulti la malnovan testamenton. Ĝi indikas al ni, ke Adamo kaj Eva niaj mitaj prauloj vivis en la paradizo. Ĉar ŝi manĝis la malpermesitan frukton (tion nomas teologoj la prapeko) Eva kaj ŝia kunulo estis forpelitaj kaj kondamnitaj (samkiel iliaj posteuloj, tio estas ni) je laboro, malsanoj, sufero kaj infero post la morto.
Tiel decidis Dio.

Tamen, iom da tempo poste, tiu sama Dio decidis permesi al la homoj sin savi. Tial li sendis sur la Teron sian propran filon (Jesuon) (*1) por ke li martiriĝu kaj pereu je terura morto, kio elaĉetus la prapekon.

La evangelioj rakontas la lastan parton de tiu ĉi historio : Antaŭ dumil jaroj laŭdire la Sankta Spirito diskrete fekundigis la Vrigulinon Maria sen la scio de ŝia kunulo la ĉarpentisto Jozefo. Jesuo laŭdire naskiĝis el tiu fekundigo. Dum pluraj jaroj li laŭdire vivis sub homa formo. Poste li estis krucumita kaj laŭdire resurektis tri tagojn poste. Finfine, kvardek tagojn post lia resurekto, li laŭdire supreniris en la ĉielon por sidiĝi dekstren de Dio. Tio estas la epizodo de la « ĉieliro de Jesuo.»

(*1) En la katolika mitologio, Jesuo estas samtempe filo de Dio kaj interna parto de Dio. Ĉar Dio estas samtempe **unu** kaj **tri** (la patro, la filo kaj la sankta spirito.) Dio - kiu estas kompleta je la origino- sub la formo de la patro ordonas al Dio sub la formo de la sankta spirito ke li fekundigu « virgulinon » por produkti Dion sub la formo de la filo. Sed de la komenco ĝis la fino estus nur unu Dio.

Tiuj, kiuj komprenis povas sin turni al sinjoro Papo, Vatikanurbo, Italio. Ili certe gajnis ion.

Tiu ĉi historio, kiu finfine ne estas malpli kredebla ol la legendo de la pluma serpento aŭ tiu de Zeŭso transformiĝante en cignon por allogi Leda-n konsistigas la bazan temon de ĉiuj kristanaj religioj.
La diversaj eklezioj klopodas « klarigi » la sencon de tiu legendo. La klarigoj memkompreneble varias laŭ la sektoj kaj la epokoj : iuj komprenas la tekston laŭlitere, aliaj vidas tie nur poezian kaj simbolan rakonton. Tamen neniu klare respondas al la plej eblaj demandoj :
-Kial post la veno de Jesuo, supozita elaĉeti la pekojn de la mondo kaj forigi la sekvojn de la prapeko, ĉio daŭris precize kiel antaŭe por la tuta homaro (suferoj, malsanoj, laboro…) ?

-Kial Dio –kiu ĉion scias- lasas la homaron peki, elpelas ĝin perforte el la paradizo kaj malsamopinias kaj absolute volas ĝin elaĉeti ?
-Kial li inventas tiel malsimplan kaj nekomprenbelan rimedon ? Li finfine decidas : li estus povinta relokigi la homaron en la paradizon tiel simple kiel li ĝin elpelis !

Alivorte oni atendas klarigojn.

Sed laŭ la eklezio tio ne estas kialo, por ke oni ne kredu la evangeliojn. Ni devas ĉirilate memorigi, ke la evangelioj estas parto de la « Nova Testamento .» La Biblio konsistas el la Malnova Testamento kaj el la Nova. Por la katolikoj « **Nur Dio estas aŭtoro de ambaŭ** » laux la esprimo de la Tridentina Konsilio (*2), kiu definitive fiksis doktrinon fontante el la unuaj jarcentoj de la Eklezio.

(*2)Por niaj latinistaj amikoj jen la eltiraĵo el la menciita dekreto de la konsilio : « *...orthodoxorum patrum exempla secuta,omnes libros tam Veteris quam Novi Testamenti, cum utriusque unus Deus sit auctor, necnon traditiones ipsas...pari pietatis affectu ac reverencia suscipit et veneratur...* »

Dio estas do la sola, la vera aŭtoro de la evangelioj. Mateo, Marko, Luko kaj Johano tenis nur la plumon por surpaperigi la Dian inspiron. Tial la Konsilio precizigas, ke tiu, kiu malakceptas tiun laŭkanonan veron « estas anatemita .» En la pasinteco viroj kaj virinoj estis publike torturataj kaj bruligataj pro multe malpli gravaj akuzoj !

Por la protestantoj kaj aparte Lutero, la absolute dia origino de la evangelioj kuŝas ankaŭ ekster ĉia dubo.
Simpla legado montras tamen, ke la evangelioj plenas je reciprokaj kontraŭdiroj : Dio, kiu jam estas triobla rakontas historion en kvarobla versio ! (*3)



Per kia blindeco ni devus ĝin kredi ?

(*3) Por rebati la antikvajn filozofojn unu el la grandaj pensuloj de la Eklezio, Sankta Justiniano uzis kun iliaj tekstoj jenan principon, kiu ŝajnas al mi tre taŭga: *la vero ne kontraŭdiras sin mem.* Kiam li trovis kontraŭdiron en la tekstoj de la filozofoj, kiujn li studis, Sankta Justiniano deklaris ilin falsaj kaj malakceptis ilin. Tiu sanktulo estus pli bone farinte uzante sian principon por la evangelioj, tio eble estus ŝparinta multe de tempo al ĉiuj…

# II - KONTRAŬDIROJ DE LA EVANGELIOJ

## -AĈA FAMILIA HISTORIO

Tiel nekredeble kiel ŝajnas, la genalogio de Jesuo varias laŭ la evangelioj. Li estas filo de la ĉarpentisto Jozefo, ĝis tie, ĉio bonas.

Sed Mateo (1,16) asertas, ke la patro de Jozefo estas iu Jakob. Ĉio tio estas mensoga asertas Luko, (3,23) la patro de Jozefo ne estas Jakob sed Eli.
Kaj ju pli oni retroiras en la familion des pli ĝi varias :

Laux Mateo la antauxuloj de Jozefo estas : Mattan, Eleazar, Eliud, Aĥim, Cadok, Azor…

Male por Luko temas pri Mattat, (ĉu simpla ortografia variaĵo ?),Levi Melĥi, Janaj.

La nomoj de la antaŭuloj ne estas la samaj de unu evangelio al la alia, kaj kiam ili estas samaj, ili ne estas laŭ la sama ordo. Bonvolu prijuĝi :

# EVANGELIO LAŬ SANKTA MATEO

Unua ĉapitro

« La genealogia registro de Jesuo Kristo, filo de David, filo de Abraham. 2-Al Abraham naskiĝis Isaak, kaj al Isaak naskiĝis Jakob, kaj al Jakob naskiĝis Jehuda kaj liaj fratoj, 3 kaj al Jehuda naskiĝis Perec kaj Zeraĥ el Tamar, kaj al Perec naskiĝis Ĥecron kaj al Ĥecron naskiĝis Ram, 4 kaj al Ram naskiĝis Aminadab, kaj al Aminadab naskiĝis Naĥson kaj al Naĥson naskiĝis Salma, 5 kaj al Salma naskiĝis Boaz el Raĥab kaj al Boaz naskiĝis Obed el Rut kaj al Obed naskiĝis Jiŝaj, 6 kaj al Jiŝaj naskiĝis David la reĝo. Kaj al David naskiĝis Salomono el la edzino de Urija , 7 kaj al Salomon naskiĝis Reĥabeam kaj al Reĥabeam Abija,kaj al Abija naskiĝis Asa, 8 kaj al Asa naskiĝis Jehoŝafat, kaj al Jehoŝafat naskiĝis Joram kaj al Joram naskiĝis Uzija 9 kaj al Uzija naskiĝis Jotam kaj al Jotam naskiĝis Aĥaz, kaj al Aĥaz naskiĝis Ĥizkaja, 10 kaj al Ĥizkaja naskigxis Manase, kaj al Manase naskiĝis Amon, kaj al Amon naskiĝis Joŝija 11kaj al Joŝja naskigxis Jeĥonja kaj liaj fratoj, je la tempo de la transloĝiĝo en Babelon. 12 Kaj post la transloĝiĝo en Babelon, al Jeĥonja naskiĝis Ŝealtiel, kaj al Ŝealtiel naskiĝis Zerubabel, 13 kaj al Zerubabel naskiĝis Abiud, kaj al Abiud naskiĝis Eljakim, kaj al Eljakim naskiĝis Azor, 14 kaj al Azor naskiĝis Cadok, kaj al Cadok naskiĝis Aĥim, kaj al Aĥim naskiĝis Eliud , 15 kaj al Eliud naskiĝis Eleazar kaj al Eleazar naskiĝis Mattan, kaj al Mattan naskiĝis Jakob, 16 kaj al Jakob naskiĝis Jozef, edzo de Maria, el kiu estis naskita Jezuo, kiu estas nomata Kristo. 17 Tial ĉiuj generacioj de Abraham ĝis David estas dek kvar generacioj, kaj de David ĝis la transloĝiĝo en Babelon dek kvar generacioj, kaj de la translogiĝo en Babelon ĝis la Kristo dek kvar generacioj. »

# EVANGELIO LAŬ SANKTA LUKO

Tria ĉapitro

« 23 Kaj Jesuo mem komencante, havis ĉirkaŭ tridek jarojn, estante filo, (kiel oni supozis) de Jozef, de Eli 24 de Mattat, de Levi, de Melĥi, de Janaj, de Jozef, 25 de Matatias, de Amos, de Naĥum, de Esli, de Nagaj, 26 de Maat, de Matatias, de Semein, de Jozef, de Joda 27 de Joĥanan, de Resa, de Zerubabel, de Ŝealtiel, de Neri, 28 de Melĥi, de Adi, de Kosam, de Elmodam, de Er, 29 de Jezu, de Eliezer, de de Jorim, de Mattat, de Levi, 30 de Simeon, de Jehuda, de Jozef de Jonam, de Eljakim, 31 de Melea, de Mena, de Matata, de Natan, de David 32 de Jiŝaja,de Obed, de Boaz, de Salma, de Naĥson, 33 de Aminabad, de Ram, de Ĥecron, de Perec de Jehuda, 34 de Jakob, de Isaak, de Abraham, de Teraĥ, de Naĥor, 35 de Serug, de Reu, de Peleg, de Eber, de Ŝelaĥ, 36 de Kenan, de Arpaĥŝad, de Ŝem, de Noa, de Lemeĥ, 37 de Metuŝelaĥ, de Ĥanoĥ, de Jared, de Mahlalel, de Kenan, 38 de Enoŝ, de Set, de Adam, de Dio. »



De Abraham (kiun oni retrovas en ambaŭ cititaj evangelioj) ĝis Jesuo, Mateo kalkulas 42 generaciojn, dum Luko trovas 56. Kia diferencego, kaj kial klarigi ĝin, se oni memoras, ke la evangellioj estas laŭdire diktataj per unu sama persono :Dio !

Dio, kiu do ne konas la homan genealogion de sia propra filo.

# -VOJAĜEMA JESUO

Kie vivis Jesuo dum sia infaneco ? Respondo al tiel simpla demando ne troviĝas en la evangelioj ! La versioj sin nome kontraŭdiras :

Por Mateo (2) la infaneto Jesuo vivis en Egiptio, kien liaj gepatroj fuĝis pro persekuto de la reĝo Herodo : iom post la vizito de la Tri Reĝoj al la novnaskito (2,11), angelo diris al Jozefo , ke li tuj rifuĝu en Egiption kun la infano, kion li faris ĝis la morto de la reĝo (2,14).

Por Luko, tute ne temas pri fuĝo en Egiption. Male, li certigas nin, ke Jesuo trankvile travivis sian infanetecon en Galileo en Nazaret (2,39-40) kie li kreskadis faj fortiĝis pleniĝante de saĝeco. Luko aldonas historieton por konvinki nin pri la realeco de sia eldiro : la dekdujara Jesuo profitas vojaĝon de siaj gepatroj al Jerusalem por tritageta forkuro (2,41 ĝis 46). Liaj gepatroj retrovas lin en la Templo miregigante la aŭskultantajn religiulojn per la inteligenteco de siaj eldiroj (2, 46-47).

# -DEK TRI DEKDUOPE

Jesuo havis dek du disĉiplojn : la apostolojn.

Por 11 disĉiploj la versioj estas identaj, se ne paroli pri kelkaj variaĵoj (malsama ordo, variaĵo de unu moknomo …)

Sed por unu el la apostoloj, Dio ne konsentas kun si mem.

Nome, Mateo (10,3) asertas, ke temas pri iu Tadeo, dum ĉe Luko (6,16) la dekdua apostolo estas iu « Judaso filo de Jakobo .»

Dio do ne kapablas memori la nomojn de siaj apostoloj, ili tamen estis nur dek du kaj li elektis ilin !

Kaj oni supozas, ke li iam juĝos « la vivantojn kaj la mortintojn », alivorte miliardojn da homoj : promesplena komenco !

## KOMPARA TABELO DE LA DEK DU APOSTOLOJ

| EVANGELIO LAŬ MATEO (10) | EVANGELIO LAŬ LUKO (6) |
|---|---|
| (2) kaj la nomoj de la dek du apostoloj estas jenaj : la unua **Simon** , kiu estis nomata **Petro**,<br>kaj lia frato **Andreo**,<br>**Jakobo**, filo de Zebedeo kaj<br>lia frato **Johano**,<br>3 **Filipo** kaj<br>**Bartolomeo**,<br>**Tomaso** kaj<br>**Mateo** impostisto ,<br>**Jakobo**, filo de Alfeo,<br>Kaj **Tadeo**,<br>4 **Simon**, la Fervorulo, kaj<br>**Judas** Iskariota, kiu ankaŭ perfidis lin. | 13 …kaj kiam tagiĝis, li alvokis siajn disĉiplojn, kaj elektis el ili dek du, kiujn li ankaŭ nomis apostoloj :<br>14 **Simonon**,kiun li ankaŭ nomis **Petro** , kaj<br>**Andreon**, lian fraton,kaj<br>**Jakobon** kaj<br>**Johanon** kaj<br>**Filipon** kaj<br>**Bartolomeon**<br>15 kaj **Mateon** kaj<br>**Tomason**, kaj<br>**Jakobon** filon de Alfeo, kaj<br>**Simonon**, nomatan Fervorulo,<br>16 kaj **Judason** de Jakobo kaj<br>**Judason** Iskariotan, kiu fariĝis perfidulo. |

# -KIU BAPTIS JESUON ?

Tion la kredantoj neniam ekscios. El teologia vidpunkto tio tamen estas grava demando.

Marko (1, 9) kaj Mateo (3, 13-16) donas al ni ambaŭ detalojn : Jesuo estis baptita de Johano.



Tute ne, respondas memcerta Luko, kiu en jena paragrefeto (3, 20) informas nin, ke Herodo « *enŝlosis Johanon en malliberejon* » antaŭ ol la sekva paragrafeto (3, 21) raportas pri la bapto de Jesuo (*4). Se Johano estis en malliberejo, kiam Jesuo estis baptata, ne li povis bapti !

(*4) Por eviti la malfacilaĵon, iuj eldonoj intermetis inter la paragrefetojn 20 kaj 21 de la 3a ĉapitro subtitolon, kiu indikas teman ŝanĝiĝon. Fakte ni estas senkonteste en la 3a ĉapitro kaj en sinsekvantaj frazoj.

# -KONFUZA ENIRO EN JERUSALEMON

Predikinte en provinco, Jesuo eniris en Jerusalemon sidante sur juna azeno (12, 14) laŭ Johano, sur du azenoj (pli precize sur azenino kaj azenido) laŭ Mateo (21, 7), kio verŝajne ne estis tamen tre facila…

Tio laŭdire okazis kvar tagojn antaŭ Pasko (laŭ Mateo) aŭ kvin tagojn (laŭ Johano).

Jesuo revenis el Betania laŭ Johano, el Betfage laŭ Mateo…
Ni reekzamenu tiun dian konfuzon :

Por Mateo, Jesuo, venas el Betfage (apud la olivarba Monto), eniras en Jerusalemon iun belan tagon (21, 10). Li eliras la saman vesperon por iri dormi al Betania (21, 17). La venontan tagon, li revenas en Jerusalemon (21, 18), parolas per multaj paraboloj kaj fininte «*ĉiujn tiujn vortojn* » li memorigas al siaj apostoloj, ke post du tagoj okazos la Pasko (26,2). Depost la eniro en Jerusalemon ĝis Pasko pasis kvar tagoj kaj la tranokto en Betania okazis do tri tagojn antaŭe.

Por Johano, Jesuo vespermanĝas en Betania ses tagojn antaŭ la Pasko (12, 1). La venontan tagon oni triumfe akceptas lin en Jerusalemo. Tute ne temas pri Betfage.

Finfine, ni ĉiam ne scias, kiel Jesuo alvenis (sur unu aux du azenoj ?), kion li trairis (Betfage-n aŭ Betania-n) nek kiam tio okazis (4 aŭ 5 tagoj antaŭ la Pasko ?).

Ĉiam tiu dia precizeco…

# -LA RABISTOJ : HULIGANOJ AŬ KREDANTOJ ?

Jesuo laŭdire estis krucumita inter du rabistoj.
Laŭ Mateo (27, 44) ambaŭ rabistoj pasigis siajn lastajn momentojn insultante Jesuon.
Laŭ Luko (23, 39-42) unu el ambaŭ ne nur ne insultis Jesuon sed male ekpreĝis al li.
Dio, kiu ĉion auxdas, ne diferencigas do la insultojn disde la preĝoj.
Kredantoj, ĉu vere indas la penon ĉeesti la diservon ?

# -LA REVENO DE JESUO

Post lia morto Jesuo laŭdire resurektis. Sed la atestoj de la evangeliistoj forte kontraŭdiras unu la alian :

Por Johano (20,14 kaj sekvo), Jesuo laŭdire unue aperis al Maria Magdalena, poste al la dek du apostoloj, kiuj ĉiuj laŭdire ĉeestis, escepte Tomason (20,24).

Por Mateo (28,1-9) Jesuo unue aperis al Maria Magdalena kaj al « alia Maria » antaŭ ol li aperis al dek unu disĉiploj (28, 16-17). Ĉar Judaso Iskariota sin mortigis en la antaŭa ĉapitro (27,5) , Tomaso tutcerte ĉeestis.

Por Marko (16, 9-14) Jesuo unue aperis al Maria Magdalena kaj poste al « du el ili » (apostoloj ?) kaj al la dek unu (apostoloj) mem.

Finfine por Luko (24, 13-36) Jesuo laŭdire aperis al du nekonatoj, (inter kiuj iu Kleopas) kaj poste al la ceteraj dek unu apostoloj (24, 33-36).

Ĉar en ambaŭ ĉilastaj versioj ne temas pri memmortigo, oni ne scias, cxu la mankanta apostolo estas Tomaso aŭ Judaso.



La resurekto estas unu el la plej gravaj legendoj de la kristanismo. La oficialaj « atestoj », el kiuj ĝi fontas, estas tiel kontraŭdiraj kaj konfuzaj ke oni povas doni al ili nenian valoron.

# JESUO : EMINENTA AŬ NEKONATA?

La evangelioj kontraŭdiras unu la alian. Sed la sama evangelio povas kontraŭdiri sin mem de unu paĝo al la alia. La aresto de Jesuo, pri kiu la evangelio atribuita al Mateo raportas, tion klare montras.

Mateo rakontas do la perfidon de Judaso : tiu ĉi devas doni kison al Jesuo por lin montri kaj tiel ebligi lian areston. Li tiucele ricevis monon. Se oni devis montri Jesuon, tio signifas, ke neniu aŭ malmultaj homoj lin konis.

Tamen, kelkajn paĝojn antaŭe, Mateo rakontas, ke Jesuo trairis la tutan Palestinon, predikante kaj farante sinsekvajn miraklojn. Sekvis lin homamasoj, kiuj avide ensorbis liajn vortojn. Li triumfe eniris en Jerusalemon, kiun strikte kontrolis la romianoj, dum la homamaso ĉirkaŭiris lin kriante « Hosanna » kaj dismetis branĉojn kaj sternis siajn vestojn sur la vojon (kiel signo pri bonveno) kaj li poste publike predikis en la templo. Alivorte oni konis lin kiel blankan lupon.

Se ĉiuj homoj (kaj memkompreneble la romianoj, kiuj ne povis ne konstati tiujn migrantajn homamasojn) konis Jesuon, kial do montrigi lin publike de perfidulo ? Ĉu la romianoj, dum ilia tuta longa historio iam komplikis al si la vivon por aresti agitanton ? Certe ne.

# -GLORA TRONO POR LA PERFIDULO

Logiko kaj kohereco tutcerte ne estas la ĉefaj ecoj de la evangelioj. Ni ekzamenu la sorton okazantan al Judaso Iskariota.

Judaso estas unu el la dek du apostoloj. Jesuo promesis al li -kiel al la dek unu aliaj disĉiploj- privilegian situacion en la paradizo :

*« Vere mi diras al vi, ke vi, kiuj min sekvis ...vi ankaŭ sidos sur dek du tronoj,... »* (Mateo, 19,28). Poste Judaso perfidas Jesuon (26, 14). Turmentita de konsciencriproĉoj, li mortigas sin per pendigo (27,5).

Ĉu Dio efektivigis sian promeson : Ĉu Judaso okupas unu el la *dek du tronoj* de la paradizo ? La evangelioj (kaj la Eklezio) tute silentas pri tio, kaj oni komprenas ilian ĝenon : se la perfidulo ne okupas tronon, Jesuo mensogis. Se li okupas tronon, ĉio estas permesita !

# -MUSTARDO PIKAS LA NAZON

En la evangelioj estas tre multaj eraroj historiaj, geografiaj kaj eĉ...botanikaj. Ni donu ĉi tie nur unu ekzemplon :

Oni legas ĉe Luko (13,19) ekzemple : *« Al kio similas la regno de Dio kaj al kio mi ĝin komparu ? Ĝi estas simila al sinapa semeto, kiun viro prenis kaj ĵetis en sian gxardenon ; kaj ĝi kreskis kaj fariĝis arbo ; kaj la birdoj de la ĉielo logxas en ĝiaj branĉoj ».*

Tamen sinapo ne estas arbo, kiel kredas la evangelio sed ...herbo, el kio oni faras mustardon, herbo, kiu do havas nek trunkon nek branĉojn !

Kontraŭdiroj, eraroj abundas en la evangelioj. Ne eblas en tiuj ĉi kelkaj paĝoj resumi ilin ĉiujn.

La malmultaj ĉi supre cititaj ekzemploj pruvas tion : la evangelioj ne estis diktataj de unu « dio » sed de homoj, mistikuloj plej verŝajne malkleraj.



# III – HISTORIO DE LA EVANGELIOJ

Eblas konsideri la evangeliojn kiel legendaron, aparte disvastigitan ĝenron en la historio de la homaro (5*)

(5*) Preskaŭ ĉiuj religioj havas sanktan libron, kiu estas efektive legendaro.

Kiel ofte en tiu ĝenro « natureco » ( pli-malpli preciza geografia kadro, historia situacio, malsanoj...) estas miksita kun supernatureco, kiu manifestigxas ĉefe per mirakloj (resaniĝoj, resurektoj...).

La menciitaj okazaĵoj havas nenian versimilecon kaj multaj historiistoj dubas pri la ekzisto de Jesuo.

Fakte ekster la evangelioj, kies enhavo, kiel ni vidis, havas nenian dokumentan fidindecon, ekzistas multaj tekstoj de homoj vivintoj en la unua jarcento de nia erao. Oni povas ekzemple citi la filozofon Seneca, la historiistojn Tacitus, Suetonius, Plutarhos, la poetoj Juvenalis, Martialis, Persius, Lucanus... Iuj el tiuj intelektuloj estis hebreoj kaj vivis sur la supozataj lokoj de la faktoj : la filozofo Philo Alexandrinus, la historiistoj Justus Tiberianus kaj Flavius Josephus ekzemple. Ĉiuj tiuj verkistoj postlasis paĝojn kaj paĝojn da tekstoj, kiuj instruas nin pri la tiamaj kutimoj kaj donas are detalojn pri la eventoj kaj la homoj.

Kion diras pri Jesuo tiuj atestantoj ?

Nenion.

Nenion, ĉar ambaŭ etaj teksteroj (6*) sur kiuj la eklezio mallerte klopodas sin apogi estas aldonaj falsaĵoj de katolikaj kopiistoj dum rekopiado de la originalaj tekstoj (7*) !

(6*) Ambaŭ tiuj teskteroj – nur kelkaj malklaregaj linioj- « enŝoviĝis » unu en la verkojn de Flavius Josephius, la alia en la « Annales » (jarkronikojn) de Tacitus.

(7*) La historiaj teknikoj (teksta komparo) ebligas eĉ dati kun precizeco la falsan paragrafeton enŝovitan en la verkon de Flavius. Ĉirkaŭ la jaro 320.

Ni rajtus postuli multe pli, se Jesuo estus ekzistinta ! Pro manko de tiamaj televidaj ĵurnaloj, Dio, venante sur la teron sub unu el siaj tri formoj por senpekigi la homaron povis elturniĝi, por ke almenaŭ unu el la tiamaj redaktistoj ekkonstatu ion ajn !

Tiel neniel estas, spite du mil jarojn da katolika esplorado ankoraŭ cxiam ne estas unu sola nerefutebla indico pri la historieco de Jesuo. Ĉiuj « materiaj pruvoj », argumentoj de la eklezio evidentiĝis kiel falsaĵoj. Ekzemple, antaŭnelonge Vatikano devis publike agnoski, ke la fama *Turina mortotuko*, dum longa tempo kaj oficiale kultata kvazaux relikvio de Kristo, aperis kelkajn jarcentojn poste. Certe la scienculoj, kiuj analizis tiun tukon verdiktis senapelacie.
Koncerne la historion de la evangelioj utilas alporti kelkajn precizigojn.

Multaj historiistoj konsideras, ke ekzistis plurdekoj da versioj de la evangelioj, ĉiuj tre malsimilaj unuj al la aliaj, kio ekde certa tempo konsistigis konsideran ĝenon por la ekspansio de la nova religio.

Pluraj klopodoj unuigi ilin estis faritaj. Ekzemple, ĉirkaŭ la jaro 170, kristano el Sirio, Tatianus, redaktis, ekde pluraj rondirantaj evangelioj, sintezon « Harmonia ».

Fine oni bezonis konsilion, okazintan en Laodikea por fiksi la aferon. Ekde 364 la eklezio konsideris kanonaj (tio signifas verecaj) la evangeliojn atribuitajn al Mateo, Marko, Luko kaj Johano; ĉiuj aliaj estis deklarataj apokrifoj, tio estas herezaj, falsaj. Notindas, ke en tiu tempo, ĉiu el la kvar evangelioj elektitaj per la konsilio de Laodikea estis la sankta libro de grava sekto. Elekti tiujn kvar permesis krei veran eklezion (*8) , kaj doni al ĝi la forton de la multeco. Tamen jam ne plu eblis, sen okazigi krizon, unuigi la kvar tekstojn en unu, de tie la nekohereco, kiun ĉiu povas nuntempe observi per iom da kritikemo.
(*8) Ne estas fundamenta diferenco inter sekto kaj eklezio. Kiel diris humoristo , « eklezio estas sukcesa sekto. »
Koncerne la etajn komunumojn, kiuj honoris la aliajn evangeliojn, ili ne estis sufiĉe potencaj por trudi sian vidpunkton kaj estis neniigitaj aux ensorbataj iom post iom. Sed tio estas alia historio.